

Pete Seeger,

Ĉiuj floroj estas for

tradukita de Wouter Pilger

Ĉiuj floroj estas for,
Kie ili estas nun?
Ĉiuj floroj estas for,
Jam de longa temp'.
Ĉiuj floroj estas for,
Knabin' ilin premis al la kor'
Ĉu nun komprenas vi?
Ĉu nun komprenas vi?

Ĉiuj knabinoj estas for,
Kie ili estas nun?
Ĉiuj knabinoj estas for,
Jam de longa temp'.
Ĉiuj knabinoj estas for,
Edziniĝis post ador'
Ĉu nun komprenas vi?
Ĉu nun komprenas vi?

Ĉiuj edzoj estas for,
Kie ili estas nun?
Ĉiuj edzoj estas for,
Jam de longa temp'.
Ĉiuj edzoj estas for,
Soldatiĝis kun dolor'
Ĉu nun komprenas vi?
Ĉu nun komprenas vi?

Ĉiuj soldatoj estas for,
Kie ili estas nun?
Ĉiuj soldatoj estas for,
Jam de longa temp'.
Ĉiuj soldatoj estas for,
En la tomboj de l' memor'
Ĉu nun komprenas vi?
Ĉu nun komprenas vi?

...

Ĉiuj tomboj estas for,
 Kie ili estas nun?
 Ĉiuj tomboj estas for,
 Jam de longa temp'.
 Ĉiuj tomboj estas for,
 Kovras ilin flor-trezor'
 Ĉu nun komprenas vi?
 Ĉu nun komprenas vi?

Ĉiuj floroj estas for,
 Kie ili estas nun?
 Ĉiuj floroj estas for,
 Jam de longa temp'.
 Ĉiuj floroj estas for,
 Knabin' ilin premis al la kor'
 Ĉu nun komprenas vi?
 Ĉu nun komprenas vi?

*Traduko de la Angla poemo "Where have all the flowers gone?" de Pete Seeger en Esperanton de WOUTER PILGER (*1942-01-26 – †2006-08-15).*

Arg-722-1454 (2012-12-11 19:06:32)

Pri Wouter Pilger vidu la vikipediejon http://eo.wikipedia.org/wiki/Wouter_Pilger. La esperantigo de la kanto troviĝas en http://eo.wikipedia.org/wiki/%C4%88iuj_floroj_estas_for. Sondis-ko kun la kantata teksto de tiu ĉi esperantigo estas aŭdebla en <http://www.ipernity.com/doc/55897/3641585>.